- 99% indicated that it was easy to understand
- 91% indicated that it informed them of things they didn't know (96% of new members said the same)
- 85% indicated that it increased their understanding of ELNA (89% of new members said the same)
- 99% indicated that they would recommend that we send it to all new members of ELNA

• 97% indicated that it was worth the 70 cents per copy it cost to produce the booklet

C) How satisfied with the various sections of the handbook were our members? A table is included with section-by-section results at the end of this article. Ratings range from "very satisfied" (7) to "very dissatisfied" (1).

D) While we recommend that the handbook be made a regular part of the "New Members Kit," there are some changes that need to be made. The major changes include:

- 1) Include a section on the "History of the Esperanto Movement in the United States" and "What Is an Esperantist?"
- 2) Provide more detailed information on UEA, TEJO, and CHIL-DREN.
- 3) Rewrite "Esperanto Terms" section, including more terms.
- 4) Replace "Donating to ELNA" with "ELNA Funding and Expense" with representative budget percentages for expenses and income. Provide information on ELNA funds.

There are many other specific suggestions that are, unfortunately, too numerous to mention here. The ELNA C.O. has kept a careful record of these and will implement as many as possible.

Final Comments

Both the *Handbook* and this survey were very rewarding projects to work on. By conducting the survey, we have gained much insight into our members, and particularly our newer members.

Like the *Book Service Survey* that ELNA conducted several years ago, we at the Central Office will attempt to put your comments, suggestions and observations into effect as soon as possible.

This summer, the Central Office is presenting more than 10 proposals to the Board of Directors and the Congress, many of which came about directly as a result of these surveys.

These proposals, if accepted, will provide many needed changes and improvements in our organization. If you have any questions or comments about these

Continued on Page 8

Surveys from Page 7

surveys or our proposals, please don't hesitate to write to the Central Office.

Finally, the *Handbook*, these surveys, this analysis and our proposals are the end result of much cooperation between many people, including the respondents to these surveys. We thank you for your help. I would also like to publicly thank all those who worked on the above-mentioned projects. In alphabetical order: Charlie Galvin, Stephen Gerry, Don Harlow, William R. Harmon, Dorothy Holland-Kaup, Ionel Onet, Cathy Schulze, Gregory Wasson, Sherry Wells, Christopher Yielding, The Board of Directors, Students and Instructors of the 18th Annual Summer Esperanto Courses at SFSU.

—Mark Stephens
Director, C.O.

Section	Rating							Overall
	7	6	5	4	3	2	1	
Typeface	62%	24%	11%	3%	—	—	—	6.45
Correspondence	52%	29%	14%	5%	—	—	—	6.28
ELNA	51%	30%	14%	4%	0.5%	0.5%	—	6.255
Useful addresses	53%	26%	15%	5%	1%	—	—	6.25
Learning Esperanto	45%	30%	19%	4%	1.5%	0.5%	—	6.115
Traveling	42%	34%	19%	4%	0.5%	—	0.5%	6.11
*E-o & Children	40%	33%	20%	6%	—	1%	—	6.04
Cover design	54%	13%	19%	10%	3%	1%	—	6.02
General layout	57%	17%	17%	2%	1%	1%	—	5.99
*UEA	41%	30%	18%	8%	3%	—	—	5.98
*TEJO	40%	30%	17%	11%	2%	—	—	5.95
*Donating to ELNA	44%	21%	23%	10%	2%	—	—	5.95
*Esperanto Terms	47%	21%	19%	8%	3%	0.5%	0.5%	5.925

*Scheduled for reworking or modification

NUN FLOROS LA RUMANA ESPERANTA MOVADO

de Prof. D-ro Ignat Florian Bociort

[La jenan artikolon ni pruntis el n-ro 1990(5) de la revuo Budapeŝta Informilo. BI jam dum multaj jaroj estas la plej utila fonto de informoj pri Esperanto-okazaĵoj en la iama Orienta Bloko, ankaŭ en Sovetunio. Komence en la nuna jaro ĝi ŝanĝis sian dikecon (8 paĝoj anstataŭ 24), sian paĝformaton (duoble tiel grandan), sian apertitmon (24 fojojn en la jaro anstataŭ 11), kaj sian celon (ĝi nun estas ne nur organo de la Hungara Esperanto-Asocio, sed ankaŭ "internacia movada kaj kultura servogazeto"). Malgraŭ lastatempa streĉiteco inter la hungara kaj rumania registaroj rilate la etnan situacion en Transilvanio kaj aliloke, rilatoj inter la Hungara Esperanto-movado kaj la renaskita movado en Rumanio restas bonaj, kaj oni ofte en BI informas pri la bezonoj de la rumania movado.]

Renaskiĝis tutlanda Esperanto-Asocio. Radio Timisoara elsendis dufoje en Esperanto kaj rumanlingve pri Esperanto. En Universitato de Timisoara reaperos grandkvalite elementa Espe-

ranto-kurso. En ŝtata eldonejo de la sama urbo aperos lernolibro, vortaro (Esperanto-rumana) kaj studo pri la monda lingvo-problemo. Registaroj, bonfaraj naciaj kaj internaciaj organizoj demandas, kion sendi al Rumanio: ĉu esperantistoj povas peri niajn sugestojn? Peto al Esperanto-organizaĵoj: laŭeble invitu al viaj Esperanto-aranĝoj niajn bravajn esperantistajn gejunulojn.

La unua libera urbo de Rumanio, heroa kaj martira Timisoara, jam delonge centro de Esperanto-movado en nia lando, estas ankaŭ la urbo, en kiu naskiĝis, la 7-an de januaro 1990, tutlanda Esperanto-asocio, laŭ iniciato de Kolektivo Esperanto kaj Interlingvistiko (KEI) de la Universitato en Timisoara. (Por plifaciligi la kontaktojn kun la centraj aŭtoritatoj kaj kun la esperantistoj en la tuta lando, la asocio translokiĝos, eble, al Bukareŝto, sed KEI restos kaj plue agados en la Universitato de Timisoara.)

La 14-an kaj la 15-an de januaro, reprezentanto de KEI salutis per radioelsendo la aŭskultantaron rumane,

hungare, germane, serbo-kroate kaj Esperantlingve, legis facilan tri-minutan Esperanto-tekston kaj dek-minutan rumanlingvan alvokon al Esperanto-asocio kaj al nobla ideo de Internacia Lingvo. Redaktoro de Radio Timisoara Libera anoncis la eblecon elsendi estonte ankaŭ Esperantlingve. La ekologia revuo de Timisoara havos ekde sia unua numero kelkajn paĝojn en Esperanto kaj pri Esperantujo. La universitato kaj la ŝtata eldonejo Timisoara (re)aperigos grandkvante *Curs elementar de esperanto* (I. F. Bociort—Mioara Lacrima Dobre) en multe pli bonaj teknikaj kondiĉoj ol antaŭe. Baldaŭ (ene de tri-kvar semajnoj) estas preta por eldono la Granda Esperanto-Rumana vortaro. Ni rezignas ĉi-momente pri aliaj detaloj. Necesas informi pri alia afero.

En la lastaj sep jaroj, la radio-stacio de Timisoara estis malfunkciigita far la burokratio de la diktaturo. (Tio okazis ankaŭ en aliaj kvar urboj.) En la lastaj dekunu jaroj neniu radio-stacio de la

Continued on next page

lando rajtis aĉeti la necesajn profesiajn aparatojn. Nun ili estas ĉiuj malnovaj kaj difektitaj, precipe en Timisoara—kampo de unuaj bataloj por libereco. Nun pluraj registaroj, bonfaraj riĉaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj (kristanaj ktp) demandas, *kion ili sendu*, kio tre necesas—por ne sendi helpon netaŭgan aŭ ne tre urĝan. Tial, la Radio-stacio Timisoara Libera petas la esperantistojn kaj la E-organizaĵojn konsili al la registaroj de koncernaj landoj kaj al la aliaj helpantoj (per leteroj, ĵurnalaj anoncoj, senperaj kontaktoj ktp) sendi al Radio kaj TV Timisoara necesajn profesiajn aparatojn aŭ objektojn. Temas—laŭ propono de la redaktoroj—pri jenaj necesajtoj:

- magnetofonoj portebaj—profesiaj radioaparatoj—tipoj UHER aŭ NAGRA,
- profesiaj magnetofonoj por radioelsendaj stacioj,
- aŭdiaj elektraj miksiloj,
- magnetofonbendoj BASF PHILIPS
- Videotonbendoj,
- profesiaj videokameraoj,
- videomiksilo,
- telekso,

- diktafonoj,
- skribmaŝinoj,
- kseroks-kopiiloj.

Kelkajn el la nomitaj aparatoj kaj objektoj nepre *bezonas ankaŭ la Esperanto-movado mem*, la klubo de KEI en la Universitato de Timisoara kaj la landa asocio de Esperanto. Tial estas konsilinde, ke oni sendu la helpojn al nia adreso: **UNIVERSITATEA DIN TIMISOARA, Colektivul de Esperanto, Bulev. V. Parvan 4, Timisoara RO-1900, Rumanio.**

La aparatojn, kiuj taŭgas nur por radio-stacio, oni sendu al: **RADIO-TELEVIZIUNEA TIMISOARA LIBERA, Str. Cluj nr. 24, Timisoara RO-1900, Rumanio.** Ni tutkore antaŭdankas por la grava helpo al la rumana popolo kaj al la progresigo de Esperanto en Rumanio.

Ni tre bone konscias, ke la Esperantaj organizoj ne estas riĉaj entreprenoj. Tial ni kuraĝas fari nur la jenajn sugestojn rilate al ebla helpo:

a) *Bonvolu laŭeble inviti niajn gejunulojn al viaj sciencaj, kulturaj, primovadaj, turismaj aŭ lingvo-*

prefektigaj aranĝoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj. Tio gravege efikos en nia lando, kiu *jardekojn mankis* el Esperantujo. Nur post nekredablaj fortostreĉoj kaj per afabla helpo de UEA, de koncernaj landaj gastigantoj (hungaroj, bulgaroj, ĉeĥoj, poloj, GDR-anoj) kelkaj gestudentoj, laboristoj, lernantoj, junaj esploristoj povis partopreni eksterlandajn aranĝojn, eĉ UK-ojn (Varna—1978, Budapeŝto—1983). La eĥo inter la aliaj gejunuloj estis grandega. Bv. sendi la invitilojn al KEI.

b) En la lastaj jardekoj, ni, rumanoj, eksciis nur hazarde, kio “laste aperis”. Oni ricevis iujn librojn per la afableco de germanoj, hungaroj, bulgaroj, poloj, ĉinoj k.a., kelkajn revuojn (el GDR, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Sud-Koreujo, Bulgario, la “Literatura(n) Foiro(n)”). Mi kaptas la okazon por danki al prof. G. Waringhien, Bruno Vogelmann, Richard Schulz, Dr. sc. D. Blanke, Gigi Harabagiu, David Sanderstrom, prof. O. Haszpra, R. Eichholz, Esperanto-grupo de Leverkusen, K. Dodu kaj multaj aliaj por ilia helpo al nia movado en la 80-jaroj.

Esperantujo Kreskas (sed ne facile)

Kompilis Ionel ONET, laŭ leteroj ricevitaĵ de BITAJ Levente, FARKAS Antal kaj Marian VOCHIN

Neimageblaj antaŭ, ni diru, unu jaro, la ŝanĝoj en la Orienta (eble, pli precize, Centra) Eŭropo estas nun realaĵoj tute ne neglekteblaj. La sola lando en tiu mondoparto el kiu—ankoraŭ—ne venis novaĵoj pri veraj ŝanĝoj estas Albanio. Sed *jam temp' está!* Ĝis fine de 1989, ankaŭ el la alia “malliberejo” eŭropa, ne venis novaĵoj. Okazis, tamen, ke decembro '89 estis tiel plena je eventoj, ke eĉ la ĵus ekliberiĝintaj rumanoj ne povas kredi ilin. Jes ja, ni parolu denove pri Rumanio (alie, ol antaŭ du jaroj; vidu *ELNA Newsletter* Julio-Aŭgusto 1988).

La socipolitikaj ŝanĝoj ne restis sen rezulto rilate la esperantistan movadon en tiu lando. La rumaniaj esperantistoj bezonis malpli ol unu monaton por reorganizi kaj reoficialigi sian landan asocion (fakte, neniam maloficialigitan laŭleĝe). Esperantistoj el la malnova “gvardio” (cetere, jam ne plu junaj) prenis la stirilon, celante revenigi la

rumanian Esperanto-movadon sur la ĝustan lokon.

En kelkaj urboj, la lokaj esperantistoj organizis lokajn Esperanto-Asociojn, kiuj—pro diversaj kaŭzoj—ne volas aliĝi al la naciskala organizo. Nu, tiuj “izolemaj” samideanoj scias ion. Mankas informoj ekzaktaj pri kiom da kluboj (re)fondiĝis. Ankaŭ la ekzakta nombro de esperantistoj en Rumanio estas nekonata, sed ĝi situas ĉirkaŭ 3000.

Malhelpata dum jardekoj, la rumania esp-ista movado spertis seriozajn malfacilaĵojn. Kaj unu inter la plej gravaj estas la izoligo, al kiu la rumaniaj esperantistoj estis submetitaj dum la lasta duonjarcento. Mankas al ili informoj pri la situacio de la Esperanto-Movado, mankas al ili la internaciaj rilatoj, kiujn alilandaj samideanoj ĝuas.

Pro la longdaŭraj malpermesoj ĉiuspecaj, la rumaniaj esperantistoj tuŝas la ricevitaĵojn esperantaĵojn kvazaŭ

sanktaĵojn. El letero ĵus ricevita el Bukareŝto, mi citas: “Mian plurjardekan Esperantan insignon prenis mia edzino. Nun mi devas almozi, por akiri alian, certe ne novan.” En alia urbo, hungarlingva esperantisto elhungarigis kurson, manskribis ĝin kaj, multobligitan (kaŝe), disdonis ĝin al interesitoj senpage. Por esperantisto el urbeto en centra Rumanio, Esperanto-novaĵletero el la pasinta jardeko estas freŝa frandaĵo. El urbo apud la hungara landlimo venis alvoko de la ĵus refundita Esperanto-klubo, per kiu oni petas precipe malnovajn esperantaĵojn “por relerni la Esperantan historion laŭ ties evoluo”.

Ŝajnas tamen, ke la kuranta jaro alportos la necesajn ŝanĝojn. La rumaniaj esperantistoj jam havis la okazon vidi kaj tuŝi periodaĵojn aperintajn pasintjare. Por kelkaj el ili, tio estas nekredbla

Continued on Page 10

Announcements

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La 26a Brazila Kongreso de Esperanto okazos ĉe la Escola de Engenharia Eletromecanica do Estado da Bahia, Salvador, ŝtato Bahia, Brazilo, inter la 6a kaj la 10a de julio. La temo estos: Esperanto, Kulturo kaj Disvolviĝo. Okazos ankaŭ ekzamenoj, artaj vesperoj, kaj balo. Interesitoj bonvolu kontakti: Societo Esperanta de Salvador, Poŝtkesto 2550, 40021 SALVADOR, Bahia, Brazilo.

Se vi povas sufiĉe rapide atingi rektan flugon de Salvador al Sovetunio, vi povos ankaŭ partopreni la 27an Baltian

Esperanto-Kongreson BEK-27 en Latvia Agrikultura Akademio en Jelgava (40 km sude de Riga) la 10an ĝis la 19an de junio. La Kongreso estos daŭrigo de la tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tendaroj, kiuj okazas ĉiujare kun kelkcent partoprenantoj. Por informoj kaj aliĝiloj: Organiza Komitato de BEK-27, p/k 150, SU-226050 RIGA 50, Latvio, Sovetunio.

Pro la sukceso de pasintjaraj aferoj, ĉijare oni organizos la 13an kaj 14an Internaciajn Semajnojn de Esperanto en la suda parto de Francio. La unua okazos en vilaĝeto Habere-Poche de la francaj Alpoj, 1000m super la marnivelo, 30 km sudoriente de Genevo, de la 25a de aŭgusto ĝis la 1a de septembro; la dua okazos ĉe la mediteranea marbordo en la havenurbo Sete, 30km okcidente de Montpellier de la 14a ĝis la 22a de septembro. Por informoj pri la

semajnfinoj: ESPERANTO, 5 rue du Docteur Roux, 34000 MONTPELLIER, Francio.

Centro "Esperanto" (u. Kievo), Kieva centra Esperanto-klubo "KARE" kaj Kieva urba Esperanto-klubo de internacia amikeco "Ora pordego" invitas dezirantojn partopreni internacian renkontiĝon InterSEJT-90 (SEJT = Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) kiu okazos la 20-30-an de aŭgusto en pitoreska ripozejo apud ĉefurbo de Ukrainio. La renkontiĝon povas partopreni esperantistoj el Sovetunio kaj el aliaj landoj. Proksimuma kvanto de la partoprenantoj estas 230 personoj. El tiu kvanto estas planataj proksimume 150 sovetianoj kaj 80 alilandaj gastoj. Por informoj, skribu al: 252222 KIEV-222, ab.kesto 88, Fedotova S. V., Sovetunio.

Continued on Page 13

Esperantujo Kreskas from Page 9

afero. Pluraj Esperanto-organizoj sendis al Rumanio delegitojn (ĝenerale portantajn helpojn al siaj samideanoj). Fojfoje, helpo venis sen akompananto. Alifojfe, delegito venis sen helpo. Sed ĉu tio gravas? Eble pli grava estas la fakto, ke oni ne forgesis la rumaniajn esperantistojn.

Ili mem ne forgesis, ke estas esperantistoj, kaj laŭ siaj ebloj agadis, spite la danĝerojn, kiujn ili frontis. Tiuj agoj montris/as kiel forta estas iu (interna) ideo. Tuj kiam pli bonaj tempoj venis, la pli-malpli kaŝitaj verduloj aperis kvazaŭ fungoj postpluve, kaj la agado komenciĝis, malgraŭ aro da malfacilaĵoj. Dumnokte, strato portanta nomon de fama komunisto prenis la nomon ESPERANTO (kaj tio, en urbeto!). Amaso de gazetoj ekaperigis Esperantajn rubrikojn (kun novaĵoj kaj precipe lecionoj), kaj radiaj disaŭdigoj en/priesperantaj jam okazis plurfoje en kelkaj lokoj. Kulturdomoj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj forpelis la esperantistojn, malfermis la pordojn al la samaj personoj, sed nur post kiam la iamaj forpelintoj iĝis forpelitoj. Bonaj novaĵoj, ĉu ne?

Sed, niaj rumaniaj samideanoj ankoraŭ ne vidis la Plenajn Ilustritajn Vortaron, nek la Esperantan Bildvortaron, kaj nur alude aŭdis pri la ekzisto de, ekzemple, *Oomoto*. Pluraj el ili neniam havis la okazon dialogi kun alilanda samideano, nek vidi la oficialan organon de UEA. Atente pakitaj, en tirkestoj, kuŝas literaturaĵoj ne senvaloraj, atendantaj eldoniston. Zorge kolektitaj Internaciaj Respond-Kuponoj forlasos Rumanion, por iĝi kontraŭpago por gazetoj, plurajn jarojn sopirataj. Sed, kiel sendi manuskripton al eldonisto se la tajpiloj kaj la papero mankas? Kiel sendi leteron al redaktoro, se la kovertoj kaj poŝtmarkoj estas netroveblaj? Ĉu ni, en aliaj landoj, pretas akcepti krajone skribitajn leterojn, enkalkulante ke la inko iĝis raraĵo en Rumanio? Kaj, fakte, al kiu skribi, se vi ne konas adreson? Pluraj el la kompatindaj rumaniaj esperantistoj hontas sendi E-lingvajn leterojn eksterlanden, neestante certaj pri la nivelo de sia lingvo. Kelkaj sentas sin ĝenataj sendi al alia lando poŝtkartojn, kiuj ŝajne rompiĝus dumvojaĝe.

La poŝto ankoraŭ malbone funkcias,

kaj pluraj el la senditaj helpoj ankoraŭ ne atingis la celitojn. Unuj inter tiuj malesperas kaj preskaŭ kabeas. Aliaj eluzas centojn da lejoj sendante malesperajn leterojn ĉien en la mondon. Foje, oni agas kvazaŭ sufokiĝante. Oni komprenu kaj pardonu tiajn agojn, kiuj havas plurjarajn radikojn en certaj vivstilo kaj eduko. Plie, la senditaj helpoj ne povas atingi ĉiujn rumaniajn esperantistojn. Eĉ se ne malgrandaj tiuj helpoj montriĝas esti nesufiĉaj.

Kvankam neniu estas devigata helpi aliajn, la ideo plurfoje esprimita "ni ne estas tie ĉi por helpi alilandajn esperantistojn" havas ion kontraŭstarantan la gravan trajton de la Esperanto-movado—la internan ideon, en kiu kredas ankaŭ la rumaniaj esperantistoj, al kiuj ni deziru sukceson sur LA NOVA VOJO.*

*sukcesa poemo verkita de rumana esperantisto, antaŭ kelkaj jardekoj.

RECENZE

Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.
Ĉe ELNA: Kodo INT006, Prezo \$3,95
(ne-membroj), \$3.75 (membroj).

Jen estas libreto kiu provizas bonegan gvidilon por la internaciaj baza kaj meza ekzamenoj. Ĝi enhavas ĉapitrojn jene:

Enkonduko: Ekzameno en komunika kapablo

Historio kaj celaro de la Ekzamenoj

Postularo de la Ekzamenoj

Regularo de la Ekzamenoj

Specimeno de la elementa Ekzameno

Specimeno de la meza Ekzameno

La libro proponas "ekzamenon kun formala sukcesgarantio".

Antaŭ ol submetiĝi al la vera ekzameno—verki eseeton, montri komprenon de artikolo, partopreni intervjuon, rerakonti bildaron, aŭskulti sonbendon—vi estos petata trapasi gramatikan kaj leksikan teston.

Tre utile el vidpunkto de la ekzamenoj estas la specimenaĵoj.

"La Strategia Plano de UEA decidis pri la ses ĉefaj fortoj kaj malfortoj de la Esperanto-komunumo. Inter la malfortoj ĝi notis "Nesufiĉa scio de Esperanto; multaj esperantistoj restas komencantoj, aŭ nesufiĉe laboras por plibonigi sian lingvoscion. Sen granda nukleo de fluaj uzantoj, Esperanto ne povas daŭrigi sian ekziston."

"Ekzamenoj formas nur unu parton de nia strebo krei pli da kapablaj Esperanto-parolantoj, tamen ĝi estas grava parto, starigante normojn kaj donante gvidon al verkantoj de lerniloj, kreantoj de studprogramoj kaj unuopaj 'gememplibonigemuloj'.

"Nur kelkloke tra la mondo Esperanto estas instruata kaj diplomata oficiale. Antaŭkondiĉo vastigi tion estas la ekzisto de komune akceptata, praktike funkcia ekzamena sistemo."

Ĉe SFSU 1989 somera programo, entute sep personoj sukcese ekzameniĝis per la ILEI meza ekzameno. Ĉe SFSU en somero 1990, Stefan MacGill, unu el la organizantoj de la ekzamenoj, gvidos ilin. Li estos unu el niaj tri SFSU-instruistoj.

—Cathy Schulze

Litovio Hodiaŭ 1(30)—1988. Vilnius: Eldonejo "Mintis", 1987. Kolorilus. 87 p.

Antaŭ sep jaroj, la prezidanto de E-klubo, kies ano (kaj sekretario) ankaŭ mi estis, donis al mi libreton, kiun mi devis recenzi—parole—post unu semajno, dum E-kunveno. Nu, mi estu sincera: vidante la devenlandon de la recenzota libro—Sovetunio—ne estis mi la plej kontenta ano de la kluĵa E-klubo. Mi akceptis la taskon, kaj dum unu semajno legis kaj relegis la belajn poemojn de Juhan Liiv, kaj la recenzo eĉ akiris aplaŭdojn.

Tempo pasis kaj multo ŝanĝiĝis en mia vivo. Vidante, antaŭ kelkaj tagoj, sub la brako de samideano, libreton el la sama mondparto, mi sentis la impulson trafolumi ĝin. Ĝuste nun, ĝi kuŝas sur mia skribotablo, kaj mi provos prezenti ĝin al vi.

Ĝia formato rememorigas al mi bonan eldonadon el Sovetunio, kiun—cetere—mi ŝatus legi en esperanta versio: Sputnik. Teknike senriproĉa, kiel preskaŭ ĉiuj E-eldonaĵoj venantaj el la Baltaj Sovetiaj Respublikoj (aŭ, se vi preferas, Baltaj landoj), la 30-a numero de LITOVIO HODIAŬ allogas. Kaj ankaŭ pli alloga—nuntempe—estas la komenco de la unua artikolo en tiu ĉi 87-paĝa libreto: "Litovia nacio multajn jarojn perdis ŝtatan sendependecon kaj nacian liberon." Ĉu aludo al la nunaj libero kaj sendependeco de la baltaj respublikoj?

Mi komparas tiun ĉi libron kun utila kaj bone organizita (sovetistile) enkonduka ekskurso. Ekskurso utila, por ĉiuj interesataj akiri iom da konoj pri unu inter la plej malgrandaj sovetaj respublikoj. Kaj la esperantistoj, kutime, estas scivolemaj. Ek, do!

Jen interesaj (sovetistilaj) datoj el la historio de Litovio kaj perspektivoj por la estontaj jaroj (ĉirkaŭ 20). Aŭtomobile, ni vizitu hodiaŭan litovan vilaĝon kun la nemalhavebla kolĥozo, kaj, poste, industrian komplekson pri leĝera (teksta) industrio, strikte rilatanta al modo, pri kiu ni povas legi artikolon. Alia industrio, malpli leĝera, estas tiu de laseroj, pri kiuj ankaŭ litovoj okupiĝas. Ili studas ankaŭ la varmon (necese fari tion en tiu

mondparto), kaj okupiĝas pri lingvistiko (jen mia plej ŝatata ero el nia "ekskurso"). Memkompreneble, la arto havas sian lokon dum nia litova "vojaĝo". Sekve de tio, ni vizitos pentraj-restaŭristojn kaj belan vilnusan preĝejon (feliĉe, restantan). Belaj infanaj pentraĵoj montratas al ni per ... televido, kaj propraokule ni partoprenos du grandajn (sovetieskajn) festivalojn (eĉ kun eksterlanda partopreno). La infanoj, kaj ne nur ili, estas invitataj viziti zoon, dum la plenkreskuloj estas konsilataj (ankaŭ de mi) legi la du mallongajn prozaĵojn kaj la vere interesan artikolon pri sukceso. Kaj, se vi laciĝis, haltu kaj ĝuu la senvortajn (malmultajn) karikaturajn, dum oni preparas kelkajn litovajn manĝaĵojn—laŭlibre. Kiel deserton, prenu kelke da noticoj pri la litova E-agado dum 1987.

Jen ĉio! Mi devas nur aldoni, ke la sufiĉe bonkvalitaj (parte koloraj) bildoj plibeligas la libreton, kiu preskaŭ ne enhavas erarojn. Estas vere, ke mi devis relegi kelkajn kapturajn frazojn, sed tio ne malpliigas la valoron de tiu ĉi revuo-libro. Mi nur bedaŭras, ke mi ne trovis klarigojn pri tio, kiel legi la litovajn proprajn nomojn. Eble, estonte ...

—lonel Onet

TKEK from Page 4

rideksplodigajn skeĉojn. Unu estas *Virino kaj la Policisto* de Stefan MacGill (ĉijara instruisto ĉe SFSU) kaj la dua estis *Komerca Mesaĝo: Sekreta Vivo de la Sandieĝa Klubo* verkita de Ellie Stein. Ellie Stein kaj Arthur Banta elstare bone aktoris. Ni ankoraŭ estis ridantaj kiam Elwin Reed kaj James Fonseca komencis *Sercojn pri Mono. Parkumado* de Charlotte Kohrs finis la programon.

Dimanĉmatene, Darlene Evans legis el la libro *Parizaj Paroladoj de Abdul Baha* tradukita de Lidja Zamenhof, kaj bele kantis por ni. Prof. David K. Jordan (UC San Diego) klarigis "Kiel Instrui Gramatikon laŭ la 'Metodo Gacond'".

Eksterŝtataj konferencoj estis Prof. Sidney Culbert kaj s-ino Ruth Culbert el WA, kaj Elisabeth Hicken el AZ.

Ni finis la konferencon per ĝis-revidoj en Santa Barbara, la unuan semajnfino post Pasko en aprilo, 1991.



ELNA CONVENTION WILL BE HELD IN MEXICO CITY
 July 7-14, 1990
 (Samtempe kaj samloke, OFICIALA ANTAŬ-KONGRESO de UEA
 +
 UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, HAVANA CUBA
 July 14-21
 —or for those not going to Cuba—
 “MEXICO, THE COLONIAL ROUTE”
 San Miguel de Allende—Guanajuato—Guadalajara—Morelia—Patzcuaro
 +
 OFICIALA POST-KONGRESO DE UEA
 Taxco, Puebla, Oaxaca
 +
TRI SEMAJNOJN VOJAGANTE EN ESPERANTUJO!!!

As of the time of writing this article, the number of registrants for the official Antaŭ-kongreso of UEA exceeds the number of U.S. registrants for our ELNA convention which is occurring simultaneously in Mexico City! Would we be embarrassed to have more guests than hosts??? We will have with us *gesamideanoj* from Australia, Belgium, Denmark, Finland, Germany, Italy (Ada Sikorska, editor of *Heroldo*), Japan, the Netherlands, Sweden, and the U.K. as well as our Mexican hosts. This will certainly be our most international national convention!

Mexico City is a truly major metropolis, and a lively, fascinating, and beautiful city! It is a modern city within a colonial city built over a period of 300 years beginning with the arrival of Cortes in 1521. Before that time there were Aztec palaces and temples of the 14th and 15th centuries; and recently archaeologists have uncovered the remnants of an ancient civilization dating back to 1500 B.C. No other city displays so beautifully and visibly its fascinating past simultaneously with its present-day culture.

The Local Congress Committee (“LKK”) in Mexico is hard at work preparing excursions and Esperanto programs that we’ll remember with joy for a long time. We have a professional guide there who is translating the basic contents of the tours and helping to train other Esperantists to act as guides. We will have one bus where the narrative will be offered only in Esperanto and the other buses will offer translations either from Spanish to Esperanto or English to Esperanto. In addition, we will have special music programs using the skills of the Mexican Esperantists, and our boat tour in the beautiful floating gardens of Xochimilco will honor Esperanto’s famous women. (Boats can’t be named after men, can they?) The local Esperantists in Mexico City are very excited about this opportunity to use and spread the use of Esperanto in Mexico!

During the UK in Cuba, U.S. Esperantists will have the opportunity of enjoying the “Colonial Route” north and west of Mexico City. And after the UK in Cuba, we will be joined again by Esperantists from around the world to enjoy a third week in Taxco, Cocoyoco, and Oaxaca—cities which bring to mind the mental picture of how “romantic” Mexico looks.

Don’t miss out on this great opportunity to enjoy and take part in “Esperantujo” so close at hand!

As North American director of Monda Turismo I receive information about all of the world-wide and ever-growing offers for Esperanto tourism. A brief overview:

- EsperantoTur in Poland operates a constant school of Esperanto in Bydgoszcz with bus tours all over Europe.
- The Hungarian Esperanto Association has created a professional Esperantist travel service with many interesting offers.
- A new Esperanto center in Kiev, USSR, has offerings in Leningrad and the Ukraine—not many, and they’re brand new, but growing.
- The Chinese Esperanto League now is offering travel in China for groups of as few as four persons at prices that used to require a group of 25 to 30.

Wi’ll be glad to give you those contact addresses and, of course, arrange your air transportation. Every day the savings available to Esperantists in travel are increasing!

ESPERANTO TRAVEL SERVICE
 6104 LASALLE
 OAKLAND, CA 94611
 (415) 339-2001

**USE YOUR ESPERANTO TRAVEL
 SERVICE FOR ALL YOUR ESPERANTO
 TRAVELS**



President: Ken Thomson (1990)
Vice President: Dr. Duncan Charters (1990)
Secretary: Virginia Stewart (1992)
Treasurer: John B. Massey (1991)
Other Board Members: Prof. James Fonseca (1990), William R. Harmon (1990), David Wolff (1990), Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992)
Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland-Kaupp (Correspondence Courses), J. Gildemeister (Legislative Affairs), R. Kent Jones (Science & Technology), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Stein (Women’s Affairs), Dr. James Cool (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs)
Director, ELNA CO: Mark Stephens
ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1990

Friend of Esperanto	\$7.50
Regular	\$25.00
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15.00
Sustaining	\$50.00
Life	\$500.00

Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

UEA dues 1990

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Socio to Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA/UEA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0996. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1990(6) of Esperanto U.S.A./The ELNA Newsletter is September 25, 1990!

ELNA Newsletter
 Volume 26, No. 3
 ISSN 0030-5065
 Esperanto League for North America,
 Inc.
 P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
 Telephone: (415) 653-0998
 Editor: Don Harlow